

ILEI – Komitat-kunsidoj – Julio 2013 – Sieber
Kunsido 3^a, 17-a de julio, 9h00-10h30

Rekunvenis la Komitato kun komence 28 voĉoj kaj fine 36, do konstante decidpova.

Estis alportita de Kroatio al la Komitato oficiala invito, ke la Konferenco de ILEI okazu iom baldaŭ en Zagrebo. La Komitato kaj Estraro dankas kaj esploras pri la venontaj jaroj. Montevideo, Urugvajo, estas decidita konferencejo por 2014. Interesa rilato estas ke la kroato Ivo Lapenna multe kontribuis al la agnosko de la valoro de Esperanto en edukado dum la konferenco de UNESKO en Montevideo (1954). Pro la UK en Lille en 2015, ni kontrolos pri ebla apuda loko por la konferenco de ILEI, ekzemple en Belgio.

Necesas aldoni la punkton rekonsistigo de la Estraro, kaj ankaŭ pritrakto de la unua protokolo de la Komitat-kunsidoj.

La Estraranoj devas esti inter 5 kaj 9, kaj en la nuna situacio estas 8.

Propono 11^a

Mirejo proponis, ke ni elektu plian estraron, Zsófia Kóródy, por konsistigi 9-membran Estraron. La propono estis unuanime **aprobita**.

Pasintjare elektiĝis sekretario kaj kasisto por periodo de 3 jaroj.

Kasisto: William (Vilĉjo) Harris. Sekretario: Radojica Petrović;

Magdaléna Fejfičová (Fejfi) servas kiel vic-sekretario.

Mirejo enketos ĉu Radojica povos normale plenumi la sekretarian laboron.

Zsófia levis la demandon pri ebla nova strukturo pli funkcikapabla, ekzemple organiza teamo konsistanta ne nur el Estraranoj, eventuale inkluzivanta laborantojn kun honorario. Volontuloj utilas, sed por membro-administrado ni bezonas ion pli stabilan. Salajro helpus.

ILEI ne povas esti oficiala ĉe UN ĉar ni ne havas stratadreson kaj oficejon. Ni planis, ke Herzberg fariĝu tia centro, kun adreso kaj seka gardloko por dokumentoj en la malnova urbodomo: tiu adreso ankaŭ povus esti UEA. Gravas decidi, esplori kaj buĝeti por esti NRO ĉe UN.

Okazis diskuto pri la elekto de vicprezidanto.

Zsófia estas proksima, teknika avantaĝo, kaj pretas servi. Pro ŝiaj kapablo kaj kvalitoj, Arko estus valora, eĉ se ŝi ne povus esti tiel proksima al la laboro, kaj ILEI estus reprezentita en kvar kontinentoj. El tiu diskuto venis propono havi du vicprezidantojn (ne senprecedenca en la historio de ILEI).

Propono 12^a

Ke Zsófia Kóródy estu unua vicprezidanto, kaj ke Arko (d-rino Gong Xiaofeng) estu dua vicprezidanto.

Post akceptita rekomendo, ke oni voĉdonu por ambaŭ samtempe, unuanime **aprobita**.

Buĝeto 2014 devas veni nur en oktobro.

Okazis iom longa diskuto pri la detaloj de transigo de la kontoj de UEA el Svedio al Nederlando, post atentigo, ke la buĝeton oni preparos ĝis oktobro por la nova kalendara jaro 2014. La kasisto disponu pri usona konto, se tio estus pli konvena (la kasisto atentigis, ke eble tio ne necesos, se li povos ĉion pritrakti rete). Kvankam kontoj povas esti ĉiuj en Nederlando, ili estu sendependaj de UEA kaj prefere ne ĉiuj en la sama banko. Necesos prizorgi leĝe akcepteblajn rajtigojn dulingvajn por Svedio kaj Nederlando (inkluzive tradukon de la statuto de ILEI en la nederlandan). Pri tio ILEI devos ricevi konsilojn, sed tiu ŝanĝo ŝajnas efektivebla kaj avantaĝa por la Ligo. Laŭ la nuna stato de la kurzoj, ŝajnas esti pli oportuna momento ol antaŭe por tia transĝirado de Svedio al Nederlando.

Propono 13^a

Ke oni akceptu la proponitan strategion rilate transĝiradon de la restantaj kontoj de ILEI en Svedio al Nederlando.

Sen kontraŭaj voĉoj aŭ sindetenoj, unuanime akceptita per 36 voĉoj. **Aprobata.**

En la diskutado pri la buĝeto, oni tuŝis la jenajn punktojn:

- La elspezoj estas ĝenerale laŭ la buĝeto – nenio ege bona aŭ malbona por raporti.
- La buĝeto por neta profito de la Konferenco estas 1400 eŭroj.
- Kotizoj enfluas dum la tuta jaro, do estas malfacile ricevi informojn por la kuranta jaro.
- Gravas tamen por fari buĝeton por 2014 ne dependu nur de la finrezultoj de 2012.
- Ni havu bonan ideon pri la evoluo dum la tuj antaŭa jaro (2013) ĉar tiu jaro plej gravas.
- Kvankam sekcioj regas la mastrumadon de sia membraro, ĉiu rajtas pagi individue.
- UEA provizas per konteltiroj ĉiumonate kun la nomoj de pagintoj al ILEI, se konataj.
- ILEI ricevas apartan konteltiron por *Juna amiko*.
- Necesas fortikeco en la membro-administra sistemo.
- Mastrolisto estu disponebla, alirebla de pli ol unu persono, en tri apartaj komputiloj.
- Membraj informoj sen stratadresoj estu travideblaj por sekciestro kun sekura pasvorto.
- La prezidanto de ILEI kaj ĉiu sekcio rajtu vidi la propran datumbazon.
- Oni kontrolu pri la sistemo por KER-ekzamenoj – ĉiu ricevas tujmesaĝon se iu aliĝas.

Proponataj ciferoj en eŭroj por disponigo fare de UEA por la jaro 2014

(oni povos ŝanĝi ĝis oktobro):

- 500 Azia agado
- 500 Afrika agado
- 1000 Latinameriko
- 1000 Instruista trejnado
- 1000 Kurso E-125
- 500 Flugfolioj
- 500 MITE
- 5000 *Entute* 6000, 1000 restas ĉe UEA por fari proprajn aferojn.

Latinameriko: gravas venigi homojn el najbaraj landaj, ĉar ne estas tiom da urugvajanoj.

Instruista trejnado: UAM Poznan ricevos de tiu sumo (RITE ne videblas en ĝi).

MITE: se ĝi ne progresos ĝis tiu grado, eble ĉio iros en instrutrejnadon (1500).

700 jam elspezitaj pro desegnaĵoj.

Dulingvaj flugfolioj ricevos 500 eŭrojn kaj ILEI povos ricevi pli.
Ni kiel partnero de UEA ricevas “financan disponigon”, ne subvencion, por nia laboro.
Sonia Risso, nia urugvaja reprezentanto, zorgos pri la konferenco: Mirejo kunlaboros.
Tiu informoj estas en la peta dokumento, kiu estas tre kompleta. Radojica havas ĝin.

Propono 14^a

Ke ni aprobu la protokolon de la unua Komitat-kunsido.
En la diskuto oni atentigis ke necesas modifi punkton 5:
Komitatano havu la rajton esti reprezentata, ne Landa Asocio.
Sub la kompreno ke plia lingvopolaro necesas, oni trovis la enhavon en ordo.
Unuanime akceptita per 36 voĉoj. **Aprobata.**

Sekvis diskuto pri reprezentado en la Komitato de UEA.
Mirejo estis Komitatano-A por Svislando de 2008.
Ŝi povos sidi en la Komitato kiel Komitatano-A nome de ILEI ekde sabato.
Zsófia povos reprezenti ĝis sabato (ŝi estas kandidato esti Komitatano-C).

La Komitato de ILEI rekunsidu antaŭ la fermo de la Konferenco inter la unua kaj la dua horo.
Tiu estos la 4^a kaj lasta Komitat-kunsido de la Konferenco.

Protokolis: Duncan Charters, 2013-8-5